

Heinrich Heine,  
Libro de la kantoj, Junaĝaj suferoj, VI  
*tradukita de Manfred Retzlaff*

Nur atendu, vi ŝipisto,  
Tuj mi iros for kun vi,  
De du inoj mi foriras,  
De Eŭropo kaj de ŝi.

Sanga fonto, vi rompiĝu  
El la korpo, el la kor',  
Ke por mia varma sango  
Skribitiĝu la dolor'.

Kial treme nun hodiaŭ  
Mian sangon timas vi,  
Kvankam staris longajn jarojn  
Antaŭ vi sangante mi.

Ĉu ankoraŭ ĝi konatas  
Al vi tiu histori'  
De serpento, kiu pomon  
Donis al pra-ul' de ni?

Same kiel mizerigis  
Tiun nia pra-patrin',  
Tiel ankaŭ vi min tentis,  
Tute vi detruis min.

*Traduko de la Germana poemo "Buch der Lieder, Junge Leiden, VI" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1983.*

*MR-137-1 / Arg-707-1422 (2012-12-07 12:35:37)*